Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 8-a de Junio 2020 (per *ZOOM*)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi.
Gastoj (*partatempe*): Michal Amir, Rami Ŝlajn, Ali Kousari.

***Protokolo** de la pasinta kunsido estos publikigota en la retejo.*

1. Raportoj:

a) Gabi: bonvolu venontfoje precizigi en la invito al la Estrar-kunsido la komenco-horon.
b) La E-forumo en la portalo ***Tapuz*** aktivas jam 16 jarojn!
c) Amri: ni devos pluvarbi por UEA-membreco.

2. Ni – kaj *Bejt-WIZO* (Jehoŝua)

Daŭre ne eblas kunveni/kunsidi tie – do ni plu uzos la zom-sistemon helpe de Amri. Krome, la trajnoj ankoraŭ ne funkcias, kaj la interurba transporto ne estas pro tio certigebla.

3. Dratverejo (Jehoŝua)

a) Amos Ŝapira prenis de la loĝantoj la lupagon por Marto, Aprilo kaj Majo (entute 9,000 siklojn) kaj ĝiris al nia konto.
b) La advokato Omid sendis al ni leteron pri la progreso de la projekto “Ĥelmit-strato”.

4. Financoj (Ŝlomo)

Ŝaul Ĥasid el la Kontrol-Komisiono reviziis la Financan Raporton, kaj subskribis. Unu punkto restis problema: Doron instruis en 2018, sed ni pagis al li la stipendion nur en 2019.

5. Landa Kunveno (Amri)

a) Ĝi povus tamen okazi en la granda salono de la Administrejo de ***Bejt-WIZO*** (kiu najbaras la Maljunulejon, ĉe David-Hameleĥ-ave. **38**), kie ni povos observi la Instrukciojn de la San-ministerio – sekure por nia membroj
b) Jehoŝua sondos ĉe la estro Yair Efrati pri la ebleco.
c) Matilda povos post la aranĝo ekzorgi pri la arta programo.
ĉ) Ŝlomo bezonos kelkajn minutojn pri la Financa Raporto kaj petos aprobon de la Ĝenerala Kunveno.

6. *Israela Esperantisto* (Mikaelo)

Jehoŝua sendis la Adres-etikedojn, sed Mikaelo ne ricevis – endas re-sendi! Ĉio estas preta, krom la revizio de la artikolo de Amri.

La venonta kunsido: la 6-an de Julio, 2020, je la 20h00

Protokolis: Gabi Zeevi